

La meksikano

Jack London



rakontotraduko

Aŭtoro	Jack London
Titolo	La meksikano
Tradukis	Dorothea & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) kaj Frank Vohla de la Esperanto-klubo Karapaco el la usona originalo
Aranĝis	Hans-Georg Kaiser Frank Vohla
Linge kontrolis	Mikaelo Lennartz
Finredakto	je la 16-a de oktobro en la jaro 2016

La meksikano

01

NENIU sciis lian historion – liaj kunkonspirantoj plej malmulte. Li estis ilia „malgranda sekreto“, ilia „granda patrioto“, kaj je sia maniero li laboris same tiel bone por la venonta meksika revolucio kiel ili. Daŭris longe ĝis ili ekkomprenis tion; ĉar eĉ ne unu el la revolucia konsilio ŝatis lin. Je la tago, kiam li unuafoje paŝis en iliajn ĉambrojn plenŝtopitajn de tre okupitaj homoj, ĉiuj suspektis lin – esti spiono, ilo en la servo de la sekreta polico de Diaz. Tro multaj el liaj kamaradoj en Usono troviĝis en civilaj kaj militaj prizonoj, kaj aliajn, ligitajn al ĉenoj, oni kondukis ĝuste en tiu tempo translimen kaj envicigis ilin por pafmortiĝo ĉe adobomuro.

Je la unua rigardo la junulo ne faris bonan impreson al ili. Preskaŭ ankoraŭ knabo li estis, ne pli olda ol dekok jarojn, ne tro granda laŭ sia aĝo kaj li klarigis, ke li nomiĝas Felipe Rivera kaj, ke li deziras labori por la revolucio. Jen ĉio – neniun plia disipita vorto, neniun plia klarigo. Li staris kaj atendis. Neniu rideto estis sur liaj lipoj, neniun afablecon en liaj okuloj. La granda verva Paulino Vera sentis internan hororon. Jen embuskis io

malpermesita, io terure nepenetrebla. Estis certa veneno, certa serpenteco en la nigraj okuloj de la junulo. La okuloj brulis kiel frida fajro, kvazaŭ kun vasta koncentrita amareco. De la vizaĝoj de la kunkonspirantoj li lasis vagi la rigardon al la skribmaŝino, ĉe kiu sidis la malgranda sinjorino Sethby, fervore laboranta. Liaj okuloj haltis je ŝiaj, sed nur por momento – ŝi levis bonŝance la rigardon – kaj ankaŭ ŝi sentis la nedifineblan, kiu paŭzigis ŝin. Ŝi devis ankoraŭfoje tralegi la skribitan por trovi la fadenon de la letero.

Paulino Vera rigardis demandante al Arrellano kaj Ramos, kaj ili rigardis sin reciproke. La necerteco de dubo kreskis laŭ iliaj rigardoj. Tiu ĉi magra vizitanto estis la nekonata, kun ĉia minaco de nekonata. Oni tute ne povis penetri en lin, estis je li io tute fora, io trans la horizonto de la honesteco de tiuj simplaj revoluciuloj, kies sovaĝa malamo kontraŭ Diaz kaj lia tiraneco estis finfine nur la malamo de honorindaj, simplaj patriotoj. Jen sentiĝis io alia, sed ili ne sciis, kio estas tio. Sed Vera, kiu ĉiam estis plej verva, plej agema, finis la embarason.

„Tre bone“, li diris sobre. „Vi diras, ke vi volas labori por la revolucio. Demetu vian jakon! Pendigu ĝin tien. Mi

montros al vi – venu – , kie estas la siteloj kaj la viŝtukoj. La planko estas malpura. Vi tuj ekviŝu ĝin ĉi tie kaj en la aliaj ĉambroj. Ankaŭ la kraĉuoj bezonas purigadon. Poste ankoraŭ la fenestroj.“

„Ĉu ĝi estas por la revolucio?“ demandis la junulo.

„Por la revolucio!“ respondis Vera.

Rivera rigardis ilin ĉiujn fride kaj suspekteme kaj poste li demetis sian jakon.

„Estas en ordo“ , li diris.

Nenion plu. Tagon post tago li venis al sia laboro – por balai, lavbrosi kaj purigi ion. Li prenis la cindron el la fornoj, alportis karbojn kaj lignon kaj bruligis fajron, antaŭ ol la plej rezoluta el la aliaj venis al sia tablo.

„Ĉu mi rajtas dormi ĉi tie?“ li demandis foje.

Aha! Tiel do – la mano de Diaz ekmontriĝas. Se li dormus en la ĉambroj de la konsilio, tio signifus, ke li havus aliron al iliaj sekretoj, al la nomlistoj, al la adresoj de la kamaradoj sur la meksika tero. Oni rifuzis la peton, kaj Rivera neniam plu demandis pri tio. Ie li dormis, sed kie?

Ie li manĝis. Sed kie kaj kion? Unufoje Arrellano ofertis kelkajn dolarojn al li. Sed Rivera kapskuante rifuzis la monon. Kiam Vera alpaŝis kaj provis trudi ĝin al li, li diris: „Mi laboras por la revolucio.“

Antaŭprepari modernan revolucion kostas monon, kaj la konsilio ĉiam estis premata. La membroj malsatis kaj laboris ĝiskolapse, kaj la plej longa labortago ne estis sufiĉe longa por ili, kaj tamen ŝajnis de tempo al tempo, kvazaŭ la revolucio starus kaj falus pro nenio alia ol pro kelkaj dolaroj. Foje, estis la unua fojo, ili ŝuldis du monatojn da lupago, kaj la luisto minacis elĵeti ilin. Estis Felipe Rivera, la purigista knabo en la aĉaj trivitaj vestoj, kiu metis sesdek orajn dolarojn sur la pupitron de May Sethby. Kaj simile alitempe. Tricent leteroj, klake tajpitaj sur la ĉiam okupataj skribmaŝinoj (petoj pri subteno, pri agnosko de organizitaj laborgrupoj, urĝaj petoj al redaktoroj pri bonvolemaj mencioj kaj protestoj kontraŭ la rifuzgesta trakado de revoluciuloj fare de usonaj juĝejoj), restis nesenditaj sur la tabloj kaj atendis afrankon. La horloĝo de Vera malaperis – la malnovspeca ora restreĉiga horloĝo, kiun li heredis de sia patro. La glata ora ringo je la ringofingro de May Sethby malaperis simile. Estis desperige, Ramos kaj Arrellano ŝiradis

kolere siajn longajn lipharojn. La leteroj devis eliri, kaj en la poŝtejo ne disponeblis kredito por la aĉetado de poŝtmarkoj. Ĉitempe Rivera surmetis la ĉapelon kaj foriris. Kiam li revenis, li metis mil ducendajn poŝtmarkojn sur la pupitron de May Sethby.

„Mi volus scii, ĉu la malbenita mono estas de Diaz?“ diris Vera al la kamaradoj.

Ili tiris la palpebrojn supren, sed ne povis decidiĝi pri li. Kaj Felipe Rivera, la visĉifonulo por la revolucio, daŭrigis havigi al la konsilio oron kaj arĝenton, se necesis.

Sed ili ankoraŭ tiam ne kapablis ŝati lin, ĉar ili ne konis lin. Li iris siajn proprajn vojojn, li ne montris fidon al ili kaj malakceptis ĉiujn provojn pri alproksimiĝo. Kaj spite al lia juneco neniu ekkuraĝis eldemandi lin.

„Eble li estas granda kaj soleca spirito, mi ne scias“, diris Arellano embarasita.

„Li ne estas homo“, diris Ramos.

„Lia animo estas elsekigita“, diris May Sethby. „Lumo kaj ridado estas elbruligita de li. Li similas al mortinto kaj

estas tamen timige vivanta.“

„Li iris tra la infero“, diris Vera. „Neniu viro povus aspekti tiel, kiu ne iris tra la infero – kaj spite tion li estas ankoraŭ junulo.“

Tamen ili ne kapablis ŝati lin. Li neniam parolis, neniam demandis, neniam proponis ion. Li aŭskultis sen esprimo kiel morta aĵo, nur liaj okuloj lumis en frida brilo, dum la aliaj interparolis pasie gloriante la revoulucion. En tiaj momentoj liaj okuloj glitis de vizaĝo al vizaĝo, de parolanto al parolanto, kvazaŭ boranta kiel inkandeska glacio, tiel ĝenanta kaj konsternanta ilin.

„Li ne estas spiono“, konfidis Vera al May Sethby. „Li estas patrioto – notu tion, la plej granda patrioto el ni ĉiuj. Mi scias tion, mi sentas. Per mia koro kaj per mia menso mi sentas. Sed lin mem mi tute ne konas.“

„Li havas danĝeran temperamenton“, diris May Sethby.

„Mi scias“, diris Vera kun sento de hororo. „Li rigardis min per siaj okuloj. Ili ne amas, ili minacas kaj estas sovaĝaj kiel tiuj de tigro. Se mi perfidus nian aferon, li mortigus min, tion mi scias. Li ne havas koron. Li estas

senkompata kiel ŝtalo, akra kaj frida kiel frosto. Li estas kiel lunlumo en vintra nokto, kiam viro frostmortas sur la supro de montaro. Mi timas nek Diaz-on nek ĉiujn liajn murdistojn, sed tiun knabon Rivera mi timas. Li estas kiel la spiro de l' morto.“

Tamen estis Vera, kiu persvadis la aliajn doni al Rivera la unuan taskon postulantan konfidon. La kontakto inter Los-Anĝeleso kaj la suda Kalifornio estis interrompita. Tri el la kamaradoj devis fosi siajn proprajn tombojn kaj tiam oni pafmortigis ilin. Du pliaj estis prizonuloj de Usono en Los-Anĝeleso. Juan Alvarado, la federacia generalo estis monstro. Li trakrucis ĉiujn iliajn planojn. Ili ne plu povis ligi kontakton al la aktivaj revoluciuloj kaj al la ekaktivaj kamaradoj en la suda Kalifornio.

La juna Rivera ricevis instrukciojn kaj estis sendita suden. Kiam li revenis, la komunikada linio estis replektita kaj Juan Alvarado estis morta. Oni trovis lin kun tranĉilo pikita profunde en la bruston, en ties lito. Tio transiris la instrukciojn por Rivera, sed la konsilio sciis, kie li kiam moviĝis. Tamen oni ne demandis lin, kaj li diris nenion. Sed ili rigardis sin reciproke kaj havis sian opinion pri tio.

„Mi diris al vi“ , opiniis Vera. „Diaz devas timi tiun junulon pli ol iun ajn viron. Li estas la mano de Dio.“

La danĝera temperamento, pri kiu parolis May Sethby, kaj kiun ĉiu el ili rimarkis, evidentiĝis ankaŭ korpe. Jen li aperis kun disŝirita lipo, jen kun nigra vango, jen kun ŝvelinta orelo. Estis klare, ke li havis ofte kverelojn ie en tiu mondo, en kiu li manĝis kaj dormis kaj havigis monon al si kaj vivis vivon, pri kiu ili sciis nenion. Post kelke da tempo li fariĝis kompostisto en la eta revolucia semajnogazeto, kiun ili eldonis. Ĉeokaze ne estis ebla al li komposti ion, ĉar liaj fingromembroj estis defrotitaj kaj disbatitaj, ĉar liaj dikfingroj estis vunditaj kaj rigidaj aŭ ĉar tiu aŭ tiu brako pendis senforte malsupren, dum lia vizaĝo tordiĝis en silenta doloro.

„Li estas vagabondo“, diris Arrellano.

„Kaj frekventanto de aĉaj lokoj“, diris Ramos.

„Sed de kie li ricevas la monon?“ demandis Vera. „Mi ĵus eksciis, ke li pagis hodiaŭ la paperkalkulon –cent kvardek dolarojn.“

„Ĝi estas el liaj malĉeestoj“, diris May Sethby, „li donas

neniam klarigon.“

„Ni devus observigi lin per spiono“, proponis Ramos.

„La spiono mi ne volus esti“, diris Vera. „Mi timus, ke vi neniam denove revidus min, krom ĉe mia entombigo. Lia pasio estas terura, li eĉ ne permesus, ke Dio starus inter li kaj sia pasio.“

„Antaŭ li mi sentas min kiel infano“, koncedis Ramos.

„Por mi li estas la pura forto, li estas la prahomo, la sovaĝa lupo, la atakanta sonserpento, la pikanta centpiedulo“, diris Arrellano.

„Li estas la karniĝinta revolucio“, diris Vera. „Li estas la flamo kaj spirito de ĝi, la nesatigebla krio pri venĝo, kiu ne eligas krion, sed buĉas silente. Li estas detruanta anĝelo moviĝanta tra la ankoraŭaj gardistoj de l' nokto.“

„Mi povus plori pro li, li konas neniun“, diris May Sethby.
„Li malamas ĉiujn homojn. Li estas sola... soleca.“ Ŝia voĉo komencis plorsingulti, kaj ŝiaj okuloj vualiĝis.

La agadoj kaj la aperoj de Rivera estis vera sekreto. Estis periodoj, kiam ili ne vidis lin dum tuta semajno. Unufoje

li forestis dum monato. Tio estis tiom pli enigma, ĉar ĉe sia reveno li metis ĉiam sen klarigo oromoneojn sur la pupitron de May Sethby. Alitempe li pasigis tagojn kaj semajnojn, sian tutan tempon kun la konsilio. Kaj en aliaj malregulaj periodoj li preferis malaperi en la plej valora tempo de la frua mateno ĝis vespere. En tiaj tempoj li venis frue kaj restadis longe. Arrellano vidis lin eĉ en noktomezoj komposti tekstojn kun freŝe ŝvelintaj manoj aŭ lipo ĵus fendigita kaj ankoraŭ sanganta.

La tempo de la krizo proksimiĝis. Ĉu okazos ribelo ĉu ne, tio dependis de la revolucia konsilio, sed la konsilio troviĝis en granda embaraso. La monbezono estis pli granda ol iam ajn, dum fariĝis pli kaj pli komplike havigi monon. La patriotoj donis sian lastan cendon kaj ne plu kapablis doni ion.

La relolaboristoj, do peonoj fuĝintaj en la ekzilon, donis duonon de sia ridinda salajro. Sed oni bezonis pli da mono. La kordisŝira, konspira streĉa subfosada laboro promesis fine fruktojn. La tempo estis matura. La revolucio balanciĝis en la mezo, aŭ tien aŭ tien. Ankoraŭ plia puŝo, ankoraŭ lasta heroa streĉo, kaj la aŭ-aŭa montrilo moviĝus al la venkoflanko. Ili konis sian Meksikon. Foje startigite. la revolucio zorgus por si mem. La tuta Diaz-maŝino renversiĝus kiel kartodomo. La limregionoj estas pretaj por la ribelo. Jankio kun cent sindikataj viroj de la sindikato IWW atendis nur la signalon por transpaŝi la limon por konkeri Malsupran Kalifornion. Sed ili bezonis fusilojn. En la tuta lando kaj rekte ĝis la Atlantiko la konsilio estis en kontakto kun ili ĉiuj kaj ĉiuj bezonis fusilojn: aventuristoj, kavaliroj de l'

hazardo, banditoj, seniluziiĝintaj usonaj sindikatanoj,
socialistoj, anarkiistoj, kruduloj, meksikaj ekzilitoj,
peonoj fuĝintaj de la sklaveco, minlaboristoj, kiujn oni
skurĝis en la prizonoj de *Coeur d'Alene* kaj Koloradio, kaj
kiuj tial estis precipe venĝavidaj kaj batalemaj— fatrasuloj
kaj feĉuloj el freneze komplikigita moderna mondo.
Fusiloj kaj municio! Municio kaj fusiloj! Jen la
seninterrompa eterna krio!

Se tiu ĉi heterogena bankrota, venĝavida bando estus foje
ĵetita trans la limon, la revolucio komenciĝus.

La doganajn oficejojn, la importhavenoj en la nordo oni
konkerus. Diaz ne povus rezisti, li ne kuraĝis ĵeti la
plimulton de sia armeo kontraŭ ili, ĉar li devis teni la
sudon, ĉar ankaŭ en la sudo disvastiĝus la flamo de la
ribelo. Urbo post urbo devus kapitulacii, federacia ŝtato
post federacia ŝtato devus ekŝanceliĝi kaj renversiĝi. Kaj
laste venus de ĉiuj flankoj la marŝo de la venkanta armeo
de la revolucio al Meksikurbo, al la lasta fortikaĵo de Diaz.

Sed la mono! La virojn ili havis, kaj tiuj atendis sen
pacienco la fusilojn. Ili konis la komercistojn, kiuj vendus
kaj liverus fusilojn al ili. Sed la konsilio elĉerpis sian

forton por la nutrado de la revolucio. La lasta dolaro estis eldonita, la lasta helpofonto barita, la lasta malsata patrioto melkita kiel bovino ĝis sekeco kaj la granda aventuro ankoraŭ nun treme moviĝis ŝvebante tien kaj tien sur la pesilo de la decido.

Fusiloj kaj municio! Oni devas armi la ĉifonulajn batalionojn. Sed kiel? Ramos vee lamentis pri sia konfiskita posedaĵo. Arrellano lamentis pri la mondisipo, kiun li diboĉe ekzercadis en sia juneco. May Sethby cerbumis, ĉu ne ĉio estus irinta pli bone, se la membroj de la konsilio en la pasinteco estus estintaj pli ŝparemaj.

„La penso frenezigas min, ke la libero de Meksiko pro kelkaj miloj da aĉaj dolaroj aŭ prosperu aŭ falu!“ diris Paŭlino Vera.

La vizaĝoj de ĉiuj esprimis desperon. José Amarillon, ilia lasta espero, ĵuskonvertito, kiu promesis monon al ili, oni kaptis en sia haciendo en Chihuahua kaj pafmortigis lin antaŭ sia propra stalomuro. La mesaĝo ĝuste alvenis.

Rivera, kiu surgenue frotlavis la plankon, rigardis supren, kun la viŝtuko en la mano kaj kun nudaj etenditaj brakoj makulitaj de kota sapakvo.

„Ĉu kvinmil dolaroj sufiĉus?“ li demandis.

Ili rigardis lin mirigite, Vera kapjesis kaj glutis, li ne povis eligi vorton, sed nova espero vigligis lin subite.

„Mendu la fusilojn“, diris Rivera, kaj tiam li permesis al si la plej longan paroladon, kiun ili iam ajn aŭskultis de li: „Ne estas multe da tempo, post tri semajnoj mi portos al vi la kvinmilon. Tio estos sufiĉe frue. Tiam la vetero fariĝos pli varma por tiuj, kiuj batalos. Do, kaj pli rapide mi ne povus fari tion.“

Vera batalis kun si mem. Estis nekredeble. Tro da espero jam frakasiĝis, de kiam li komencis la revolucion ludon. Sed li emis fidi al la ĉifonula frotlava junulo de la revolucio kaj tamen li ne kuraĝis fidi lin.

„Vi estas freneza“, li diris.

„Post tri semajnoj“, diris Rivera. „Mendu la fusilojn.“

Li ekstaris, ŝovis la manikojn de la ĉemizo malsupren kaj surmetis la jakon.

„Mendu la fusilojn“, li diris. „Mi nun ekiros.“

Post longa kurado kaj hastado, sennombraj telefonaj interparoloj kaj sakroj oni kunsidis en la nokto en la kontoro de Kelly. Kelly estis superŝutita de negocoj, kaj krome li malbonŝancis. Li kontrakte devigis la boksiston Danny Ward el Nov-Jorko, kaj li aranĝis boksbatalon inter li kaj Billy Carthey, kiu okazu post tri semajnoj. Kaj nun Carthey de du tagoj, zorgeme kaŝita kontraŭ la okuloj de la sportreporteroj, devis kuŝi en la lito pro grava vundiĝo. Ne estis alia ulo, kiu povus anstataŭi lin. Kelly kiel freneziĝinto telegrafis pro kiu ajn akceptebla boksisto de la leĝera peza klaso en la usona oriento, sed ĉiuj estis ligitaj al fikistaj datoj kaj kontraktoj. Sed nun li havis esperon, eĉ se nur feblan.

„Vi havas infere bonajn nervojn!“ diris Kelly, post unua rigardo, kiam ili kunestis.

En la okuloj de Rivera ekfulmis malica malamo, sed lia vizaĝo konservis sian neskueblan esprimon.

„Mi povas nokaŭti Wardon“, estis ĉio, kion li diris.

„Kiel vi povas scii tion? Ĉu vi iam ajn vidis boksi lin?“

Rivera kapneis.

„Li povas frakasi vin per unu mano kaj kun fermitaj okuloj“.

Rivera suprentiris malŝate la ŝultrojn.

„Ĉu vi havas nenion por diri?“ grumblis la batalaranĝisto.

„Mi povas nokaŭti lin.“

„Ĉu vi efektive jam iam boksbatalis?“ demandis Mikaelo Kelly. Mikaelo estis la frato de la aranĝisto, li posedis la Yellowstone-bilardejojn kaj enspezis konsiderindajn monsumojn el la boksbataloj.

Rivera favoris lin per severa senresponda fiksa rigardo.

La sekretario, nepre sporta junulo de karakteriza sportista tipo, nazblovis aŭdeble.

„Nu, vi konas Roberts-on“ , rompis Kelly la venenan silenton. „Li jam devus esti ĉi tie. Sidiĝu kaj atendu, kvankam vi ne havas bonŝancon laŭ via magra aspekto. Mi ne povas oferti trompmaĉon al la publiko. La lokoj ĉe la ringo kostas dekkvin dolarojn, vi scias tion.“

Kiam Roberts alvenis, li evidente estis iom ebria. Li estis alta, svelta, longmembra ulo, kaj lia irado kiel lia parolado estis trankvila kaj treniĝema.

Kelly tuj celis la kernon de la afero.

„Diru foje, Roberts, vi fanfaronis, ke vi malkovris tiun ĉi malgrandan meksikanon. Vi scias, ke Carthey rompis la brakon al si, ĉu? Nu, kaj tiu malgranda flavbekulo havas la impertinentecon hodiaŭ enkuri ĉi tien kaj diri, ke li intencas iri en la ringon por Carthey. Kion vi pensas pri tio?“

„Estas en ordo, Kelly“ , Carthey respondis treniĝeme. „Li kapablas boksbatali.“

„Vi ja ne eble eĉ intencas konvinki min, ke li povas venki Wardon“ , diris Kelly atakeme.

Roberts pripensis la aferon.

„Ne, tion mi ne asertos. Ward estas boksmasino. Sed li ankaŭ ne tuj dishakos Riveran. Mi konas Rivera. Li neniam montras malfortan flankon, mi almenaŭ ankoraŭ ne vidis iun. Kaj li boksas per ambaŭ manoj simile bone.“

El ĉiu pozicio li povas kroĉi dormigan pugnon.“

„Sendepende de tio, kian specon de spektaklo li povos prezenti? Vi trejnitis boksistojn dum via tuta vivo. Mi demetas mian ĉapelon antaŭ viaj fakaj konoj. Ĉu li povos eksciti la publikon por la mono?“

„Tion certe, kaj krome li multe ĉagrenos Wardon. Vi ne konas la bubon, sed mi lin konas. Mi malkovris lin. Li ne havas malfortan flankon. Li estas speco de diablo. Se iu demandos vin, vi povos diri, ke li viglas kiel ŝamana sorĉisto. Ward kaj vi ĉiuj ege malfermŝiros la okulojn. Mi ne volas aserti, ke li venkos Wardon, sed ĉiukaze li montros siajn kapablojn, tiel, ke vi ĉiuj ekkonos estontecan ĉampionon je li.“

„Bone“ . Kelly turnis sin al la sekretario. „Telefonu Wardon. Mi promesis al li, ke mi informos lin, se tio indas la penon. Li estas ĝuste transe en la Yellowstone-oficejo kaj vetludas kiel kutime.“

Kelly turnis sin denove al Roberts: „Kion vi volas trinki?“

Roberts trinketis el sia glaso kaj malŝarĝis sian animon.

„Mi ja ankoraŭ ne rakontis al vi kiel mi trovis la junulon. Antaŭ kelkaj jaroj li aperis en la kampadejo. Mi ĵus trejnis Prayne por la batalo kontraŭ Delanay. Prayne estas fia. Ne estas eĉ sparko da kompatato en li. Li terure traktis siajn trejnpartnerojn, kaj mi povis trovi neniun, kiu havis la emon plu trejni kun li. Jen mi rimarkis tiun malgrandan malsatan meksikanon, kiu ĉiam vagadis ĉi tie kaj observis ĉion. Mi estis malesperiĝinta kaj ne sciis kion fari. Jen mi tiris lin al mi, surmetis al li boksgantojn kaj puŝis lin en la ringon. Li estis pli rezistema ol tanita ledoto, sed malforta. Kaj tamen li ankoraŭ ne sciis eĉ literon de la alfabeto pri la boksarto. Prayne preskaŭ rompita la ripojn de li. Sed li tamen eltenis pendante du rondojn, antaŭ ol li laciĝis. Estis nenio alia krom la malsato. Ĉu li estis primartelita? Nu, li ne rekoneblis. Mi donis al li duonon de dolaro kaj ion bonan por manĝi. Vi devus vidi kiel lupe malsate li voris tion. De tagoj li ne manĝis eĉ buŝplenon. Tio estas lia fino, mi pensis. Sed je la venonta tago li revenis, rigida kaj vundita, sed avida pri tio denove perlabori duonon de dolaro kaj bonan tagmanĝon. Kaj iom post iom li fariĝis pli kaj pli kapabla. Li estas la naskita boksisto kaj neimageble rezistema. Li ne havas koron. Li estas peco de glacio. Kaj en la tuta tempo, kiam

mi jam konas lin, li parolis eĉ ne dek vortojn en unu parolo. Li silentas kiel trabosegisto, sed li faras sian laboron.“

„Mi vidis lin“ , diris la sekretario. „Li laboris sufiĉe ofte por vi.“

„Ĉiuj ĉi elstaraj uloj elprovis sin je li“ , respondis Roberts, „kaj li lernis de ili. Mi vidis kelkajn el ili, kiujn li povus nokaŭti. Sed lia koro ne partoprenis. Mi pensas, ke li neniam vere ŝatis la ludon. Almenaŭ li kondutas tiel.“

„Li batalis en la lastaj monatoj sufiĉe ofte en malgrandaj kluboj“ , diris Kelly“ .

„Certe! Sed mi ne scias, kio subite obsedigas lin. Subite li malkovras sian koron por tio. Li atakas kiel raketo kaj venkas ĉiujn regionajn heroojn. Ŝajne li bezonas la monon kaj li ankaŭ gajnis atentindajn sumetojn, eĉ se oni ne vidas tion je liaj vestoj. Stranga ulo! Neniu scias, kion li faras kutime. Neniu scias, kiel li pasigas sian tempon. Meze en la laboro li subite forkuras kaj malaperas por la resto de la tago. Kelkfoje li forestas dum semajnoj. Sed oni ne povas konsili ion al li, li ne atentigas ĝin. Riĉa posedo atendas tiun viron, kiu scias lin manaĝeri, sed li

ne konsideros tion. Atentu foje precipe pri tio, kiom multe li celas kontantan monon, se vi interkonsentas kun li la kondiĉojn.“

Jen la momento, kiam Danny Ward alvenis. Nun la societo estis kompleta. Lia manaĝero kaj trejnisto alvenis kun li, kaj li mem envenis kiel urĝa trablova brizo el afableco, kun gaja humuro kaj plena de konkeremo pri amikoj. Danny salutis ĉiujn, havis por ĉiu ŝercon, humuran respondon, rideton aŭ ridon. Tio estis lia maniero, sed ĝi ne estis tute aŭtentika. Li estis bona aktoro, kaj li malkovris, ke genieco kaj afableco ne estas malestimindaj, se oni volas fari karieron en la mondo. Sed profunde de lia animo li estis sobra, sangofrida batalisto kaj negocisto. Ĉio alia estis masko. Tiuj, kiuj konis lin aŭ faris negocojn kun li, diris, ke Danny ne lasas mistifiki sin, se temas pri io vere decida. Li estis neeviteble ĉeestanta dum ĉiuj negocaj interparoloj kaj kelkaj asertis, ke lia manaĝero estis nur ilo, kies ununura tasko estas servi kiel laŭtparolilo.

La maniero de Rivera estis tute alia. En liaj vejnoj fluis kaj la sango de indiĝenoj kaj tiu de hispanoj. Li sidis silente kaj senmove en angulo en la fono, kaj nur liaj

nigraj okuloj glitis de vizaĝo al vizaĝo kaj notis ĉion.

„Tio estas do la bubo“, diris Danny kaj taksante lasis vagi sian rigardon laŭ la proponita kontraŭulo. „Kiel vi fartas, knabĉjo?“

La okuloj de Rivera briltremis venene, sed li ne moviĝis por doni signon de agnosko. Li povis flari neniun gringon, sed tiun li ekmalamis tiom, kiom tio estis nekutima eĉ je li.

„Dio mia!“ Danny protestis gaje turniĝante al Kelly. „Vi ja ne eble volas, ke mi batalu kontraŭ surdmutulo.“ Kiam la ridado trankviliĝis, li denove mistifikis lin: „Pri Los-Anĝeleso devas stati malbone, se tio estas la plej bona, kion vi povas oferti. El kiu infanĝardeno oni plukis vin?“

„Li estas bona knabeto, Danny, fidu pri tio“, defendis lin Roberts. „Li ne tiel facile venkeblos kiel tio ŝajnas.“

„Kaj la bokshalo jam je duono estas elvendata“, diris Kelly insiste peteme. „Vi devos akcepti lin, Danny. Jen la plej bona, kiu havigeblis.“

Danny ĵetis plian fojon senzorgan kaj neflateman

rigardon al Rivera kaj ĝemis.

„Mi devos trakti lin iom gardeme, mi supozas. Kaj mi esperas, ke li transvivu!“

Roberts blovis kolere tra la nazo.

„Vi devos esti atentema“ , avertis la manaĝero de Danny.
„Oni ne povas scii pri tia novulo, ĉu li ne tamen sukcesos lanĉi neatenditan bonŝancan baton.“

„Okej, mi ja gardos min, en ordo“ , ridete diris Danny.
„Mi tuj dekomence prenos lin en mian bebovartistan flegon, por ke la kara publiko havu sian plezuron. Kion vi pensas pri dekkvin rondoj, Kelly? Kaj poste mi faru haŝeon el li.“

„Tio sufiĉos“ , tuj venis la respondo. „Tiom longe, kiom aspektos reala.“

„Tiukaze ni do ekparolu pri la negoco.“ Danny eksilentis kaj postkalkulis. „Memkompreneble, sesdek kvin procentojn, kiel kontraŭ Carthey. Sed alia dispartigo por mi. Okdek procentoj estus la ĝusta por mi.“

Kaj turniĝante al sia manaĝero: „Ĉu en ordo?“

La manaĝero kapjesis.

„He, vi, ĉu vi komprenis tion?“ demandis Kelly al Rivera.

Rivera skuis la kapon.

„Nu, la afero statas tiel“, klarigis Kelly. „La batalmono estas sesdek kvin procentoj de la malneta enspezo. Vi estas novico kaj tute nekonata. Vi kaj Danny dispartigos tiel: vi ricevos dudek procentojn kaj okdek Danny. Tio estas justa, ĉu ne, Roberts?“

„Tre justa“, Roberts konsentis.

„Komprenu“, Roberts konsentis. „Vi ankoraŭ ne havas reputacion.“

„Kiom da mono restos ĉe sesdek kvin procentoj de la malneta enspezo?“ demandis Rivera.

„Nu, eble kvinmil, eble eĉ okmil“, enmiksigis Danny por klarigo. „Proksimume tiel do. Via pagoparto estos ĉirkaŭ mil aŭ mil kaj sescent. Tute beleta sumeto por laŭorda hajlo da batoj ricevita de viro tia, kia mi. Kion vi pensas pri tio?“

La respondo de Rivera prenis la spiron de ambaŭ.

„La venkonto ricevos ĉion“ , li diris decide.

Fariĝis kviete kiel en tombo.

„Tio estas ja tiel, kvazaŭ oni volus forpreni bombonon de infaneto“ , klarigis la manaĝero de Danny.

Danny skuis la kapon. „Mi estas tro longe en la negoco“ , li klarigis.

„Mi volas suspektigi nek la ringojuĝiston nek la ĉeestantojn iel. Mi ne volas paroli pri vetperistoj kaj pri certaj aferoj, kiuj okazas de tempo al tempo. Sed mi rajtas ja diri, ke tio estus malbona negoco por boksisto tia, kia mi. Mi ludas sekure. Mi scias, ke mi venkos. Pri tio ne estas dubo. Sed mi ja povus rompi la brakon al mi, he? Aŭ iu kanajlo ĵetos iun fi-substancon en mian trinkaĵon, ĉu?“
Li skuis solene la kapon. „Ĉu mi venkos, ĉu mi malvenkos – mi ricevos okdek procentojn. Kiel pensas vi, meksikano?“

Rivera skuis la kapon. Danny eksplodis – nun fariĝis tro por li.

„Kial? Malgranda ŝmirmonulo? Mi emus tuj nun forblovi vian melonkapon.“ Roberts intervenis per sia pedanta hezitema maniero por malhelpi malicaĵojn.

„La venkinto ricevos ĉion“, paŭte ripetis Rivera.

„Kial vi insistas pri tio?“ demandis Danny.

„Mi povas venki vin“, li sincere respondis.

Danny eksaltis kaj estis forĵetonta la surtuton. Sed tio estis, kiel lia manaĝero sciis, nur blufado kaj pozo. La surtuto ne falis malsupren, kaj Danny lasis trankviligi sin de la aliaj. Ĉiuj simpatiis kun li.

Rivera staris sola.

„Komprenu, klaŭneto“, reargumentis nun Kelly. „Vi estas neniulo. Ni scias, kion vi faris en la lastaj monatoj: Vi venkis kelkajn regionajn batalantojn. Sed Danny estas altranga. Se oni vidos lin post tiu batalo denove en la ringo, temos pri ĉampioneco. Sed vi estas tute malkonata. Ekstere de Los-Anĝeleso ankoraŭ neniu iam aŭdis ion pri vi.“

„Ili aŭskultos pri mi“, ŝultroleve respondis Rivera. „Post

tiu ĉi batalo.“

„Vi ja ne supozas eĉ nur momenton, ke vi povus venki min?“ objĉetis Danny.

Rivera kapjesis.

„Nun aŭskultu foje, fariĝu prudenta“ , diris Kelly insiste.

„Pensu pri la reklamo!“

„Mi volas havi la monon“ , respondis Rivera.

„Vi ne povas venki min, eĉ ne post mil jaroj“ , Danny certigis al li.

„Kial vi do estas tiel obstina?“ demandis Rivera. „Se la mono tiel facile gajneblas, kial vi do ne volas riski ĝin?“

„Mi volas, Dio helpu al mi!“ vokis Danny subite konvinkite. „Mi batmortigos vin en la ringo, knabo mia, ĉar vi tiel simie mistifikas min. Pretigu la kontrakton, Kelly, dissendu la artikolojn, la venkonto ricevos ĉion. Fervore reklamu en la sportgazetoj. Rakontu al la homoj, ke estos batalo inter du personaj malamikoj. Mi instruos tiun ĉi flavbekulon.“

La sekretario de Kelly komencis skribi, sed Danny interrompis lin. „Unu momenton!“ Li turnis sin al Rivera: „La pesado, ĉu?“

„En la ringo“ , estis la respondo.

„Ne en via vivo, flavbekulo. Se la venkinto ricevu ĉion, la pesado estos morgaŭ matene je la deka.“

„Kaj la venkonto ricevos ĉion, ĉu?“ demandis Rivera.

Danny kapjesis. Tio decidis la aferon. Li do eniros la ringon en la plej forta stato.

„Pesado estos je la deka“ , konsentis Rivera.

La kraĵono de la sekretario daŭrigis skrapi.

„Tio kostos kvin funtojn“ , Roberts plendis al Rivera.

„Vi tro fordonis“ , diris Roberts al Rivera. „Danny tute certe surplankigos vin. Li estos tiel forta kiel bovo. Vi ne havos eĉ tiom da bonŝancoj kiel rosoguto en la infero.“

La respondo de Rivera estis bone kalkulita hatoplena rigardo. Eĉ tiun gringon li trovis abomeninda, kaj li

trovis, ke li estas la plej blanka gringo el ĉiuj.

Oni apenaŭ atentis Riveran, kiam li iris en la ringon. Oni salutis lin nur per sporada sufiĉe senkora aplaŭdado. La spektantoj ne fidis al li. Li estis la ŝafido gvidata buĉejen de la potenca Danny. Krome la spektantoj estis seniluziiĝintaj. Ili atendis furiozan batalon inter Danny Ward kaj Billy Carthey, kaj nun ili devis kontentiĝi pri tiu mizera novico. La publiko montris sian misplaĉon pri la evento ankaŭ tiel, ke ili vetis du je unu aŭ eĉ tri je unu por Danny. Kaj la koro de vetanta publiko ĉiam estas je la flanko de sia mono.

La meksika knabo sidis en sia angulo kaj atendis. La minutoj rampadis. Danny lasis atendi lin. Tio estis malnova truko, sed ĝi havis ĉiam efikon je la komencantoj. Ili fariĝis timemaj, se ili tiel sidadis kaj atendis, plenumitaj de korprenigaj antaŭdivenoj, vidalvide kun senkompata fumanta publiko. Sed ĉifoje la truko ne funkciis. Roberts pravis: Rivera ne havas malfortan flankon. Li, kiu estis pli delikata kaj pli sentema kaj havis pli fajnajn nervojfibrojn ol ili ĉiuj, ne estis nervoza. La atmosfero de antaŭkondamno en lia angulo ne impresis lin. Liaj sekundantoj estis gringoj kaj

stranguloj: aĉuloj – la kota rubo de la bokssporto, sen honor sento, sen kapablo. Kaj krome senpasiigis ilin la sento devi stari en la angulo de la venkoto.

„Nun vi devas esti atenta!“ avertis lin Spider Hagerthy. Spider estis lia unua sekundanto. „Eltenu tiom longe, kiom eblas – jen la instrukcioj de Kelly al mi. Se vi ne faros, la gazetoj skribos pri plia ŝajnbatalo kaj batos eĉ pli grandan bluan okulon al la sporto en Los Anĝeleso.“

Ĉio ĉi ne estis vere instiga, sed tio glitis de Rivera kiel pizo de la muro. Li malestimis boksbatalon premian. Tio estis la malamata ludo de la malamataj gringoj. Li mem sufiĉe ofte spertis ĝin, kiel buĉmaterialo por aliaj en la trenejoj de la kampadejoj, sed nur ĉar li estis malsata. La fakto, ke li estis kvazaŭ kreita por tiu sporto, signifis nenion por li. Ĝis li venis al la konsilio, li ne boksis por mono, sed poste li kolektis monon sufiĉe facile. Kaj li ne estis la unua inter la homaj filoj, kiuj malkovras, ke ili sukcesas en malestimata okupo.

Li ne analizis. Li sciis nur, ke li devos venki en tiu batalo. Alia fino ne eblas. Ĉar post li, puŝinta lin al tiu konvinko, staris pli profundaj fortoj, pri kiu neniu en la bokspubliko

eĉ nur sonĝis ion. Danny Ward batalis por mono kaj por la agrablajoj, kiujn la mono povas havigi al li en tiu ĉi vivo. Sed tio, por kio batalis Rivera, bruligis sin en ties cerbon – kiel flamo kaj kun teruraj vizioj. Kiam li nun kun vaste malfermitaj okuloj sidis soleca en sia angulo de la ringo kaj atendis sian trukoriĉan kontraŭulon, li vidis la viziojn tiel, kvazaŭ li reale travivus ilin.

Li vidis la blankajn murojn de la akvoenergia fabriko de Rio Blanco. Li vidis la ses mil malsatajn palajn laboristojn kaj la sep- kaj ok-jarajn infanojn, kiuj laboraĉis en longtempaj skipoj por dek cendoj ĉiutage. Li vidis la migrantajn laboristojn, la fantomecajn mortulajn kraniojn de la laboristoj en la tinkturejo. Li memoris sian patron nomi la tinkturejon la suicidejon, ĉar nur unu jaro da laboro tie signifis jam la morton. Li vidis la malantaŭkortan loĝejon kun sia patrino, kiu kuiris kaj kiu de mateno ĝis vespero streĉite dommastrumadis, sed tamen havis tempon karesi kaj ami lin. Kaj li vidis sian altstaturan patron kun lia densa liphara barbo kaj larĝa brusto, lian patron, kiu, pli afabla ol ĉiuj, amanta ĉiujn homojn, havis koron, kiu superfluis de amo, tiom da amo, ke ankoraŭ sufiĉe da ĝi restis por la patrino kaj la malgranda *muchacho*, kiu ludis en angulo de la

malantaŭdoma korto. En tiuj tagoj li ne nomiĝis Felipe Rivera. Li nomiĝis Fernandez, kiel lia patro kaj lia patrino. Lin ili nomis Juan. Pli poste li ŝanĝis la nomon, ĉar li rimarkis, ke la nomo Fernandez estas malamata de la policaj ĉefoj, de la politikaj oficejoj kaj de la kamparaj milicoj.

La granda, varmkora Joakino Fernandez! Li okupis elstaran lokon en la vizioj de Rivera. Tiam li ne komprenis lin, sed kiam li nun retrorigardis, li ekkomprenis. Li povis vidi lin, kiel li kompostis litertipojn en la eta presejo aŭ ĉe la plene okupita makulita pupitro, kiel li haste kaj nerveze skribadis senfinajn zigzagajn liniojn. Kaj li rememoris la strangajn vesperojn, kiam la laboristoj en la tenebro sekrete aliris kvazaŭ homoj, kiuj intencas fari fiaĵojn, kiel ili renkontis lian patron kaj dum horoj parolis kun li, dum li, la *muchacho*, ofte sen dormo, kuŝis en sia angulo.

Kvazaŭ el granda foro li aŭdis la voĉon de Spider Hagerthy, kiu diris al li: „Do, ne sternu vin tuj ĉekomence. Tio estus kontraŭ la instrukcioj. Akceptu vian la batojn kaj rikoltu vian ŝmirmonon.“

Dek minutoj pasis, sed li ankoraŭ nun sidis en sia angulo. Oni vidis nenion de Danny, kiu evidente etendis sian trukon ekstreme.

Sed pliaj vizioj brulis en la memoro de Rivera. La striko, aŭ pli bone priskribate la elbariĝo de la laboristoj, ĉar la laboristoj de Rio Blanco helpis al siaj strikantaj fratoj en Puebla. La malsato, la „ekspedicioj“ en la montojn pro beroj, radikoj kaj herboj, kiujn ili manĝis kaj kiuj kaŭzis stomakajn spasmojn kaj ventrodolorojn. Kaj tiam okazis la terura inkuba afero antaŭ la magazeno de la kompanio: La soldatoj de la generalo Rosalio Martinez kaj de Porfirio Diaz kaj la morton sputantaj fusiloj, kiuj neniam volis ĉesi lavi la pekojn de la laboristoj en ties propra sango. Kaj tiu nokto! Li vidis la malaltajn ĉarojn, sur kiuj la mortintoj estis alte tavoligitaj, antaŭvidata por Verakruco, kiel nutraĵo por la ŝarkoj en la golfo. Li revidis sin grimpi trans la makabran monton de mortintoj por serĉi kaj trovi la patran kaj patrinan kadavrojn parte nudigitajn kaj perforte traktitajn. Precipe klare, li membris sian patrinon – nur ŝia vizaĝo elrigardis, la korpo estis kaŝita de dekoj da mortintoj. Denove knalis la fusiloj de Porfirio Diaz, kaj li vidis sin haste forkuregi kiel ĉasata kojoto sur la montoj.

Al liaj oreoj penetris laŭta muĝado simila al la maro, li vidis veni malsupren Danny Wardon je la pinto de lia sekvantaro el trejnistoj kaj sekundantoj tra la meza irejo. La publiko sovaĝe muĝis pro entuziasmo pri la populara heroo, kiu estis destinita venki. Ĉiuj jubilis al li. Ĉiuj estis por li. Eĉ la sekundantoj de Rivera elspiris malŝarĝite kaj pliboniĝis ilia humuro, kiam Danny lerte kliniĝis sub la ŝnuregoj kaj glitis en la ringon. Lia vizaĝo montris senfinan rideton. Kaj se Danny ridetis, ridetis ĉiu colo de lia vizaĝo ĝis la sulketoj en la okulanguletoj kaj ĝis la profundoj de la okuloj mem. Neniam oni vidis tian genian batalanton. Lia vizaĝo estis kuranta reklamo por bonvolemo kaj kamaradeco. Li konis ĉiun. Li ŝercis kaj ridis kaj salutis siajn amikojn tra la ŝnuregoj. La aliaj, pli foraj, kiuj ne povis bridi sian admiron vokis laŭte: „Ho, Danny!“ Jen ĝoja kora inklino per aplaŭdaj ovacioj, kiuj daŭris kvin minutojn.

Rivera restis sen priatento. Por tio, kio interesis la publikon, Rivera ne ekzistis. Spider Hagerthy kliniĝis kun ŝvelita vizaĝo super lin.

„Ne ektimu“ , Spider avertis lin.

„Kaj ne forgesu la instrukciojn. Vi devos elteni. Ne sternu vin. Se vi sternos vin, ni poste tradraŝu vin en la transvestigejo. Komprenite, ĉu? Vi simple devas batali.“

La publiko ekaplaŭdis. Danny trapaŝis la ringon, rekte al Rivera kaj kliniĝis al li. Li prenis manon de Rivera intersiajn kaj premis ĝin per impulsa bonkoreco. Lia girlandeca rideto estis proksima al Rivera. La publiko elkriis sian rekonon pri la prezentita sportspirito de Danny. Danny salutis sian kontraŭulon kun la korinklino de frato. Liaj lipoj moviĝis kaj la publiko ne povanta aŭdi la vortojn parolatajn de li kaj supozanta ilin sportiste afablaj diroj, kriis denove. Nur Rivera aŭdis la mallaŭte diritajn vortojn.

„Eta meksika rato, kiu vi estas“ , elpenetris sible inter la ridetantaj lipoj „mi elŝiros viajn intestojn.“

Rivera ne moviĝis. Li ne ekstaris. Li montris sian malamon nur per la okuloj.

„Ekstaru, hundo“ ,kriis iuj viroj de malantaŭe tra la ŝnurego.

La amaso komencis sibli kaj huis kontraŭ li pro lia

malsportistmaniera konduto, sed Rivera ne moviĝis. Nova aplaŭdego salutis la boksiston Danny, kiam li moviĝis tra la ringo reen al sia angulo.

Kiam Danny demetis la mantelon, oni vokis : „Ha!“ kaj „Ho!“ Lia korpo estis perfekta, vigla pro elasteco, sano kaj forto. La haŭto estis blanka kiel tiu de junulino kaj tiel glata. Multe da gracio, rezistokapablo kaj energio estis je li. Tion li pruvis en dekoj de bataloj. Lia bildo iris tra la tuta sport- kaj kulturgazetaro.

Ĝemado eksonis, kiam Spider Hagerthy detiris la trikotveston trans la kapon de Rivera. Lia korpo pro lia nepaleco ŝajnis esti pli magra ol ĝi estis efektive. Li havis muskolojn, sed tiuj ne tiom impresis kiel tiuj de la kontraŭulo. Sed tio, kion la publiko tamen pretervidis, estis lia profunda brusto. Kaj la publiko ankaŭ ne imagis – ne povis imagi tion – kia persistemo estis en lia karno kaj kia eksploda forto en liaj pugnoj, kiel fajnaj estis liaj fibroj, kiuj kiel dratoj etendiĝis en lia tuta korpo kaj faris tiel el li grandiozan batalmaŝinon. La ununura, kion la publiko vidis, estis brunhaŭta dekokjara junulo kun korpo, kiu aspektis kiel tiu de knabo. Alie estis pri Danny. Jen viro dudekkvarjara kaj lia korpo estis tiu de viro. La

kontrasto estis eĉ pli okulfrapa, kiam ili staris unu apud la alia en la mezo de la ringo kaj aŭdis la lastajn ringojuĝistajn atentigojn.

Rivera konstatis, ke Roberts sidis rekte malantaŭ la sportreporteroj. Li estis eĉ pli ebria ol kutime kaj lia parolo pro tio eĉ pli treniĝema.

„Estu trankvila, Rivera“ , grumblis Roberts.

„Batmortigi li ne povos vin. Tion ne forgesu. Li tuj dekomence ege atakos vin, sed ne lasu vin perpleksigi pro tio. Simple kovru vin, staru firme kaj klinĉu. Li ne povas vundi vin tro. Imagu simple, ke li kazaŭ tradraŝas vin en la trejnhalo.“

Rivera ne donis signon, ke li aŭdas lin.

„Grumbla diableto“ , murmuris Roberts al sia najbaro.

„Tiel li ĉiam estis.“

Sed Rivera forgesis ĵeti sian kutiman venenan rigardon al li. Vizio de senfine multaj fusiloj kvazaŭ blindigis liajn okulojn. Ĉiu vizaĝo en la spektantejo, tiel, kiel li povis vidis ĝin, ĝis la plej multekostaj lokoj, ŝanĝiĝis en fusilon,

kaj li vidis la longan meksikan limon antaŭ si – seka, elsuĉita de la suno, plena de ĝemoj, kaj je tiu limo la ĉifonulajn arojn, kiuj malfruiĝis nur pro la fusiloj.

Li atendis starante tute malantaŭe en sia angulo. Liaj sekundantoj rampis tra la ŝnuregoj eksteren kaj kunprenis siajn faldoseĝojn. Danny rigardis lin transverse en la kontraŭa angulo de la kvarangula ringo. La gongo eksonis, kaj la batalo komenciĝis. La publiko hurlis pro plezuro. Ankoraŭ neniam la publiko ĉeestis batalon, kiu komenciĝis pli konvinke. La gazetaro pravis. Estis batalo de malamikoj. Tri kvaronojn de la distanco Danny trapasis per salto, por povi ataki la korpon de sia kontraŭulo, avanco, kiu klare perfidis, ke estis lia intenco vori la etan meksikanon kun haŭto kaj hararo. Li atakis nek per unu bato, nek per du battoj, nek per deko de battoj. Estis giroskopo de battoj, ciklono de detruo. Rivera kvazaŭ perdiĝis. Li estis ŝutkovrita, tombigita sub lavango de duraj battoj, kiujn lanĉis de ĉiu ajn pozicio kaj angulo la fama majstro de l' boksarto. Rivera ŝanceliĝis, balaita kontraŭ la ŝnuregojn, reŝirita de la ringojuĝisto kaj plian fojon ĵetita kontraŭ la ŝnuregojn.

Tio ne estis batalo, estis buĉado, masakro. Ĉiu alia

publiko, krom tiu de premia boksbatalo, estus elĉerpita en tiu unua minuto. Efektive: Danny sciis, kion li kapablas – estis grandioza uverturo. La publiko tiom certis pri sia juĝo kaj ĉe tio estis tiel ekscitita kaj favorema, ke ĝi tute pretervidis, ke la meksikano plu staris sur siaj piedoj. Ili tute forgesis la boksiston Rivera. Ili apenaŭ vidis lin, tiom li perdiĝis sub la virovorema atako de Danny. Minuto tiel pasis kaj ankoraŭ plia. Tiam la publiko, en momento, kiam la batalantoj estis disigataj, vidis dum momento la meksikanon. Unu el liaj lipoj estis fendigita, lia nazo sangis. Kiam li turnis sin kaj ŝanceliĝante ekklinĉis, oni vidis tie, kie li tuŝis la ŝnuregojn, ruĝajn striojn sur lia dorso, el kiu fontis sango. Sed kion la publiko ne rimarkis, tio estis, ke lia brusto ne forte laboris, kaj ke liaj okuloj fride radiis kiel kutime. Tro da ambiciaj estontaj majstroj en la kruela mondo de trejnejoj provis jam similajn kruelajn atakojn je li. Por salajro de duono de dolaro ĝis dekkvin dolaroj semajne, li lernis elteni – dura instruado, kiun li trairis.

Jen okazis perpleksiga afero. La konfuziga intermiksiĝo de pugnoj, kies detaloj oni apenaŭ povis sekvi, subite ĉesis. Rivera staris sola tie. Danny, la nepridubebla Danny, kuŝis sur la dorso, lia korpo ekstremis, dum li lante

rekonsciiĝis. Li nek ŝanceliĝis, nek li sinkis planken nek lante falis. La dekstra hokopugno de Rivera trafis lin, kiam Danny ŝvebis en la aero, kun la subiteco de l' morto. La juĝisto mansignis al Rivera, ke li retiriĝu kaj kliniĝis super la falintan gladiatoron, nombrante la sekundojn.

La publiko de prezpremia boksbatalo kutime aplaŭde jubilas post nokaŭtiga bato. Sed tiu ĉi publiko ne jubilis. La afero okazis tro netatendite. La nombrado de la sekundoj estis akompanata de streĉita silento, kiu estis disŝirata per la jubila voĉo de Roberts.

„Mi ja diris al vi, ke li boksas per ambaŭ pugnoj!“

En la kvina sekundo Danny turniĝis pene sur la vizaĝon, kaj kiam la juĝisto nombris la sep, li apogis sin sur unu genuon, preta ekstari tuj dum la naŭ antaŭ ol dek estos dirita. Se lia genuo dum 10 ankoraŭ tuŝus la plankon, tiukze li estus konsiderata „malsupra“ kaj do „venkita“. En tiu momento, kiam lia genuo estos leviĝinta de la planko, li estos rigardata kiel staranta, kaj en la sama momento la dekstra pugno de Rivera rajtos bati lin denove planken. Sed Rivera ne bonŝanĉis. Rivera volis uzi la okazon. Tuj kiam la genuo de Danny estus

solviĝinta de la planko, li ekbatus denove. Li rondiris sian kontraŭulon, sed la juĝisto ŝovi sin inter ilin kaj Rivera sciis, ke la sekundoj, kiujn li nombris, estis tre lantaj sekundoj. Ĉiuj gringoj estis kontraŭ li, eĉ la ringojuĝisto.

Dum „naŭ“ la juĝisto puŝis Riveran tiom, ke li estis retroĵetata. Tio estis malsportuleca. Per tio Danny sukcesis restariĝi, kun denova rideto sur la lipoj. Duone kurbiĝinte kaj per la brakoj defendantaj la vizaĝon kaj la abdomenon, li ŝanceliĝis antaŭen kaj lerte ekklinĉis. Laŭ la reguloj de la bokssporto la juĝisto estus devigita disigi Danny-on de Rivera, sed li ne faris, kaj Danny kroĉiĝis al li kiel marŝaŭmonde frapata lapo, kaj Danny iom post iom rekolektis fortojn. La lasta minuto de la rondo rapidis. Se li eltenus ĝis ties fino, li povus ripozi tutan minuton en sia angulo. Kaj li eltenis kaj ridetis spite al siaj despero kaj mizero.

„Danny reridetas!“ kriis unu el ili kaj la publiko laŭte ridis pro malŝarĝiĝo. „Damnitan puŝforton havas tiu ŝmirulo“, Danny diris spiravide en sia angulo al sia konsilanto, dum liaj asistantoj kiel freneze prilaboris lin.

La dua kaj la tria rondo ne estis sovaĝaj. Danny, kiu estis

ruza kaj perfekta ringogeneralo, starigis sin kaj blokis por ripozi de la obtuziga bato ricevita en la unua rondo. En la kvara rondo li ree estis tute la malnova. Kvankam li estis tre elĉerpita kaj traskuita, lia bona fizika stato ebligis al li regajni siajn fortojn. Sed li ne denove provis la virovoran taktikon. La meksikano montriĝis danĝera tartaro.

Anstataŭ tio li nun prezentis siajn plej bonajn boksartifikaĵojn. Pri ĉiuj trukoj, sperto kaj trejniteco li estis majstro; eĉ, se li ne povis lanĉi ion decidan, li ja plu prilaboris per batoj sian kontraŭulon kaj iom post iom lacigis lin laŭ ĉiuj reguloj de la boksarto. Li batis trifoje, se Rivera batis unufoje, estis puntrafoj, sed ne neniigaj. La sumo de multaj batoj donu la finan neniigon. Li respektis la novicon, kiu batis simile bone per ambaŭ manoj, kaj kies pugnoj eksplodis mirinde mallongbrake.

En la defendo Rivera evoluis maltrankviligan rektecon de la maldekstra pugno. Ĉiam denove, atakon post atako tiu elpafiĝis kaj terure lezis la buŝon kaj la nazon de Danny. Sed Danny adaptiĝis. Ĝuste tio estis, kial li estis estonteca ĉampiono. Li povis laŭplaĉe ŝanĝi batalmanieron kontraŭ alia. Nun li pli proksimiĝadis al sia kontraŭulo. Pri tio li estis speciale ruza. Tiel li povis eviti la maldekstran

pugnon de la alia. Nun li plurfoje kapablis sovaĝigi la publikon, sed li kronis tion per potenca hoko, kiu suprenlevis la meksikanon en la aeron kaj faligis lin sur la maton. Rivera ripozis sur unu genuo kaj uzis la sekundojn, sed profunde interne li estis konvinkita, ke la juĝisto tre mallongigis la sekundojn por li.

En la sepa rondo Danny denove sukcesis lanĉi diablan hokon supren. Li tamen nur ŝanceligis Riveran. Sed en la sekva momento, kiam tiu staris senhelpa kaj sendefenda, li traflugigis lin per bato inter la ŝnuregoj. La korpo de Rivera falis sur la kapojn de la gazetistoj, kaj ili repuŝis levis lin supren sur la platformon ekstere de la ŝnuregoj. Ĉi tie li ripozis sur unu genuo, dum la juĝisto rapidege nombris la sekundojn. Interne de la ŝnuregoj, tra kiuj li devis kliniĝi por povi ree atingi la batalejon, atendis Danny. La juĝisto nek interŝovis sin, nek li repuŝis Danny-on.

La spektantoj estis ekster si pro entuziasmo. „Buĉu lin, Danny, buĉu lin!“ oni kriis.

Dekoj da voĉoj daŭrigis la krion ĝis ĝi sonis kiel la milithurlado de lupoj.

Danny faris sian plej bonan, sed kiam la juĝisto ne nombris naŭ, sed nur ok, Rivera subite jam glitis inter la ŝnuregoj internen kaj savis sin per klinĉado. Nun la juĝisto tuj ĉeestis, deŝiris lin, tiel, ke li povis trafi lin, li helpis al la boksisto Danny tiom, kiom malsportuleca juĝisto povas ankoraŭ helpi al li.

Sed Rivera eltenis la atakon kaj la nebulo foriĝis el lia cerbo. Ili ĉiuj estas samaj. Ili estas la malamataj gringoj, kaj ili ĉiuj estas malhonestaj. Sed eĉ en la plej teruraj momentoj lumis kaj radiis la vizioj en lia cerbo – longaj trajnoj kun vagonaroj, kiuj tamtamas tra la dezerto, kamparaj milicoj, usonaj policanoj, prizonoj kaj karceroj, vagabondoj kaj cisternoj – la tuta turmentiga aĉa panoramo, kiun li vidis en sia odiseado post la tagoj de Rio Blanco kaj post la striko. Kiel grandiozan vizion li vidis balai la grandan ruĝan revolucion tra la tuta lando. La fusiloj ĉeestis, antaŭ li. Ĉiu unuopa malamata vizaĝo estis fusilo. Por la fusiloj li batalis. Li estis unueca kun la fusiloj. Li estis la revolucio. Li batalis por la tuta Meksiko.

La publiko ekĉagreniĝis pri Rivera. Kial li ne akceptas la batohajlon ordigitan al li? Kompreneble li estos venkita, sed kial li tiom obstinas? Nur tre malmultaj interesiĝas

por li, kaj tio estis la difinite limigita procentaĵo de ludantoj, kiuj ludis riskan ludon. Kvankam ili certis pri la venko de Danny, ili tamen vetis kvar je 10 aŭ unu je tri favore al la meksikano. La vetoj konsiderindis, kiom da rondoj Rivera eltenos. Kelkaj eĉ facilanime vetis, ke li ne eltenus sep, ja eĉ ne ses rondojn. Tiuj, kiuj kontraŭvetis, do jam gajnis kaj tiel bonŝance solvis la demandon rilate la riskitan monon, nun aliĝis al la alia flanko kaj subtenis la favoraton.

Rivera rifuzis, ke Danny venkas lin. En la oka rondo Danny provis vane ripeti la suprenhokon. En la naŭa rondo Rivera denove perpleksigis la publikon. Enmeze de klinĉo Rivera liberigis sin per rapida fleksebla movo kaj en la malvasta distanco inter iliaj korpoj lia dekstra sagis supren ekde la koksa alto.

Danny falis planken kaj eluzis la nombradon. La spektantoj estis alarmitaj. Li estis atakita en sia propra specialfako. Lia fama dekstra suprenhoko estis uzata kontraŭ li mem. Kiam li dum naŭ ekstaris, Rivera ne provis trafi lin kiam estis nombrata la naŭ. La juĝisto ja evidente blokis lin en tiu momento, sed male tion li paŝadis flanken, kiam Rivera estis tiu, kiu ĵus devis

ekstari.

En la deka rondo Rivera dufoje kroĉigis el koksa alto dekstran suprenhokon kontraŭ la mentonon de sia kontraŭulo. Danny pli kaj pli desperiĝis. Lia rideto eĉ ne momenton forlasis lian vizaĝon, sed li reprovus siajn virovorajn atakojn. Sed kiom ajn li dancadis, li ne povis fari ion decidan kontraŭ Rivera, kiom ajn li kirloventis, li ne povis damaĝi Riveran. Sed Rivera en la kaosa kirlado eĉ trifoje plankenbatis lin. Danny ne tiom rapide reakiris siajn fortojn. Kaj en la dekunua rondo la afero fariĝis serioza por li, kvankam li de tiam ĝis la dekkvara rondo montris la plej bonan, kion li prezentis en sia tuta kariero. Li staris firme, blokis la alian, batalis ekonomie kaj penis regajni fortojn, kiujn li jam foruzis. Krome li batalis kaŝe tiom fie, kiom kapablas tion nur sperta boksisto. Ĉiun fian artifikon kaj ĉiun intrigon li uzis, li klinĉis, sed ŝajne nur hazarde. Li premegis la boksgantojn de Rivera inter brako kaj korpo kaj metis sian propran ganton sur la buŝon de Rivera por senspirigi lin. Ofte dum klinĉoj, kiam ili korpe proksimis unu al la alia, li siblis abomenajn kaj neeldireblajn insultvortojn inter la diskrevitaj sed ridetantaj lipoj en la orelojn de Rivera. Ĉiu de la ringojuiĝisto ĝis la publiko prenis la partion de Danny kaj

helpis lin. Kaj ili sciis, kion li intencis fari. Subigite de la mirigaj surprizoj de la nekonatulo, li metis ĉiun esperon en unu decidan baton. Li malfermis sian defendon kaj akceptis la batojn, li kvazaŭ fiŝkaptadis, ŝajnis eksveniĝojn kaj tiris je sia kontraŭulo, por ke tiu malfermu por momento la defendon, por ke tio permesu al li per tuta forto ekbati kaj turni la batalon. Kiel faris tion jam alia pli granda boksisto antaŭ li, li eble provis trafi sian kontraŭulon per dekstra hoko sur la mentonon kaj per maldekstra sur la sunplekson. Li kapablis tion, ĉar li estis konata pri sia puŝforto, kiu restadis en liaj brakoj, tiom longe kiom li iel povis teni sin sur la piedoj.

La sekundantoj de Rivera en la paŭzoj inter la rondoj zorgis nur malmulte por li. Ili iom sekigis lin per svingado de mantukoj, sed ventumis al liaj pumpumantaj pulmoj ne multe da aero. Spider Hagerthy donis al li konsilojn, sed li sciis, ke estis fiaj konsiloj. Ĉiuj estis kontraŭ li. Li estis ĉirkaŭata de perfido. En la dekkvara rondo li denove surplankigis la boksiston Danny kaj ripozis staranta, dum la juĝisto nombris la sekundojn. El la alia angulo Rivera aŭskultis suspektan flustradon. Li vidis kiel Mikaelo Kelly iris al Roberts, kliniĝis al li kaj flustris ion al tiu. La oreloj de Rivera estis kiel tiuj de kato, dezerte ekzercita, li aŭdis

frazfragmentojn de tio, kion Mikaelo diris.

Li volonte volis aŭdi pli, kaj kiam lia kontraŭulo leviĝis, li sukcesis manovri la batalon tiel, ke ili klinĉis transe ĉe la ŝnuregoj.

„Li devas“, li aŭdis paroli Mikaelon, Roberts kapjesis.

„Danny devas gajni – mi perdus amason da mono – mian propran monon – se li trairos la dekkvinan rondon, mi estos bankrota – la ulo agos laŭ tio, kion vi diras.

Tranŝovu iom al li.“

„Kaj nun Rivera ne plu vidis viziojn. Ili provis mistifiki lin. Ankoraŭ plian fojon li sendis Danny-on sur la plankon kaj ripozis, la manoj apogataj je la flankoj. Roberts ekstaris.

„Li estas finita“, li diris. Iru en vian angulon.“

Li parolis aŭtoritate, tiel, kiel li ofte parolis en trejnado al Rivera. Sed Rivera rigardis lin malamplene kaj atendis, ke Danny ekstaros.

Kiam li ree sidis en sia angulo, en la paŭza minuto, venis Kelly, la entreprenisto, al Rivera kaj parolis al li. „Ĵetu la

mantukon, damnita ulo!“ Li siblis mallaŭte kun raŭka voĉo. „Vi devas sterni vin, Rivera. Faru, kiel mi diras, kaj mi sekurigis al vi vian estontecon. La sekvan fojon mi lasos vin venki kontraŭ Danny. Sed ĉifoje devas kuŝi sur la planko vi.“ Rivera per rigardo komprenigis, ke li aŭdis la vortojn, sed li montris per neniu signo, ĉu li konsentas ĉu ne.

„Kial vi diras nenion?“ demandis Kelly ĉagrenite.

„Vi perdas en ĉiu kazo“, aldonis Spider Hagerthy. „La juĝisto ne lasos vin venki. Obeu al Kelly kaj sternu vin!“

„Jes, sternu vin, knabo mia!“ petegis Kelly. „Tiukaze mi helpas al vi ĝis la ĉampioneco.“

Rivera ne respondis.

„Mi faros tion, do helpu nun al mi, knabo mia.“

Kiam la gongo eksonis, Rivera sentis, ke iu danĝero minacas lin. La publiko ne rimarkis tion. Kion ajn tio povus esti – ĉiukaze minacis interne de la ringo kaj tute en lia proksimo. Danny ŝajne regajnis sian pli fruan memcertecon. La konfido, kun kiu Danny proksimiĝis,

timigis Riveran. Evidente iu fia truko estis uzota. Danny saltis al li, sed Rivera evitis kunpuŝiĝon. Li sekurigis sin per tio, ke li flankeniris paŝon. Tio, kion la alia atendis, estis klinĉo. Ĝi estis iel necesa, por ke la fia truko sukcesu. Rivera retroiris kaj rondcirklis malproksimen de la kontraŭulo, sed li sentis, ke la kunpuŝiĝo kaj la truko pli frue aŭ pli malfrue okazos. Despere li provis elŝovi la momenton. Kiam Danny ree sturme atakis, Rivera kondukis tiel kvazaŭ li volus klinĉi. Sed en la lasta momento, kiam iliaj korpoj estis kunpuŝontaj, li rapide retrosaltis. Kaj en la sama momento eksonis el la angulo de Danny la voko: Fiago! Rivera mistfikis ilin. La ringojuĝisto hezitis nedecideme. La decida frazo, kiun li jam formulis sur la lipoj, falis neniam, ĉar knabovoĉo sur la galerio kriis: „Trompoprovo!“

Danny laŭte insultis Riveran kaj atakadis, sed Rivera evitis lin dancece. Rivera decidis nun ne plu bati al la korpo de la alia, per tio li riskis duonon de la bonŝanco gajni, sed li sciis, ke li, se li vere volas venki, devas eviti la proksimdistancan batalon. Ĉe la plej eta eblo ili kulpigus lin je „fiago“. Danny lasis ĉiun memgardemon flanken. Dum du rondoj li persekutis kaj batis la junulon, kiu ne kuraĝis batali proksimdistance. Ĉiam denove Rivera estis

trafita; li devis akcepti la batojn je dekoj, por eviti la danĝeran proksimdistancan batalon. Ĉe tiu unika finprezentado de Danny la publiko leviĝis kaj kvazaŭ ekfreneziĝis. Ĝi komprenis nenion pri tio, kio okazis. La sola afero, kiun ĝi povis vidi, estis, ke la favorato tamen venkos post ĉio.

„Kial vi ne batalas?“ ili kriis kolere al Rivera.

„Malkuraĝulo! Malkuraĝulo! Ek, hundaĉo!

Buĉu lin, Danny! Buĉu lin! Vi jam havas lin, buĉu lin!“

En la tuta halo Rivera estis la ununura, kiu retenis sian fridan sangon. Laŭ temperamento kaj raso li estis la plej pasia el ĉiuj, sed li jam estis elmetita al multe pli grandaj ekscitiĝoj, tiel, ke tiu komuna pasio krianta el dek mil gorĝoj, kiuj leviĝis ondon post ondo, al li ne signifis pli ol la velura frideto de somera vespero.

En la deksepa rondo Danny daŭrigis sian prezentadon, Rivera, trafita post forta bato, ekŝanceliĝis, liaj manoj falis senhelpe malsupren, dum li ŝajne malvoleme reŝanceliĝis. Nun Danny pensis, ke lia bonŝanco estas veninta. La ulo nun estis sub lia kontrolo. Sed Rivera

superruzis lin per aktora ŝajnigo kaj trafis lin kun modele rekta dekstra pugno sur la buŝon. Danny falis. Kiam li ekstaris, Rivera ree surplankigis lin per dekstra hoko kolen kaj nukon. Tion li ripetis trifoje. Neniu juĝisto de la mondo povus paroli ĉimomente pri „fiago“.

„Ho, Bill! Bill!“ Kelly insiste petegis la ringojuĝiston.

„Mi povas fari nenion“, diris lamente la juĝisto. „Li ne donas al mi okazon.“

Danny, preskaŭ tute detruita, heroe starigis sin denove kaj denove. Kelly kaj aliaj en la proksimo de la ringo komencis voki la policon, por ke tiu intervenu, kvankam la angulo de Danny rifuzis ĵeti la mantukon. Rivera vidis kiel la dika serĝento faris nelertan provon tragrimpi sub la ŝnuroj, kaj li ne klare sciis, kion signifas. Tiuj gringoj sciis trompi je tiom da manieroj ĉe boksbatalo. Danny resurpiediĝinte, ŝanceliĝis nesekure kaj senhelpe antaŭ li tien kaj tien. La juĝisto kaj la policisto ambaŭ etendis la manojn al Rivera, kiam li batis lastan fojon. Ne estis plu kaŭzo interrompi la batalon, ĉar Danny ne plu ekstaris.

„Nombro!“ Rivera kriis raŭke al la juĝisto.

Kaj kiam la nombrado estis finita, la sekundantoj levis la boksiston Danny kaj portis lin en ties angulon.

„Kiu estas la venkinto?“ demandis Rivera.

Malvoleme la juĝisto kaptis iun el liaj boksgantmanoj kaj tenis ĝin supre.

Rivera ne ricevis bondezirajn salutojn. Sen akompano li iris en sian angulon, kie liaj sekundantoj ankoraŭ ne starigis la faldseĝon por li. Li apogis sin perdorse kontraŭ la ŝnuregoj, furioze rigardis ilin plena de malamo, li fikse rigardis ilin kaj movis la okulglobojn preter la dekmiloj de la gringoj. Liaj genuoj tremis kaj li singultis pro elĉerpiteco. Antaŭ liaj okuloj ondadis la malamataj vizaĝoj tien kaj tien, kapturnige naŭzigaj. Sed tiam Rivera rekonsciigis, ke ili signifas fusilojn. La fusiloj estis liaj. La revolucio daŭrigeblis.

Postrimarko

La rakonton oni publikis unue en la gazeto „*The Saturday Evening Post*“, je la deknaŭa de aŭgŭsto en la jaro 1911.

Finredakto

16.10.2016